# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024: 42; decembro 1.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Sen alkroĉaĵo. Sume 300 KB

## Mediteranea mezmarta paradizo



La Mediteranea Esperanto-Semajno 2025 okazos **de la 15-a ĝis la 22-a de marto 2025** en la hotelo Miléade en **Les Issambres** en Suda Francio. La semajno inkluzivos **Esperantajn kursojn kaj konversaciajn rondojn** por tri grupoj kaj kompletan distran programon, kaj ekskurson por profiti la belan veteron de la Lazura Marbordo komence de la printempo.

**Kursoj estos gvidataj de elstaraj instruistoj:**

- kurso 1 (komencparolantoj): Rodica TODOR (Rumanio)
- kurso 2 (pri Esperanto-literaturo): Pawel Fisher-KOTOWSKI (Pollando)
- kurso 3 (kurso pri ekologio): Manfred WESTERMAYER (Germanio)

Pli da detaloj aperas sur la retejo de Esperanto-Provence aŭ vi povas sendi al ni retmesaĝajn demandojn.

## Sorio en la serio

La venonta 83-a Hispana Kongreso okazos inter la 1-a kaj la 4-a de majo 2025, en la bela kaj historia kastilia urbo Soria (Sorio). Anonco: https://kongreso.esperanto.es/

Jam eblas aliĝi. Iru al la formularo en: https://www.esperanto.es/soria2025
Pliaj informoj: https://eventaservo.org/e/83HEK
Kaj malgranda video prezentanta la eventon:
https://www.youtube.com/watch?v=PybHVJNavyk

José Antonio del Barrio, http://www.delbarrio.eu

## Aminde el Madagaskaro

Jen la elsendo numero 144 de Aminda Radio Esperanto el Malagasio. Krom kelkaj lokaj novaĵoj, ni provizas vin artikolo pri la situacio de la tradukado kaj interpretado en nia lando. Se nia retradio helpas vin pli ekscii pri Malagasio, ne hezitu finance subteni ĝin cele al ĝia materiala plibonigado. https://youtu.be/xQ5LndCfXQE

## Greka reviviĝo

Hodiaŭ mi faris la unuan lecionon de la kurso por greklingvaj komencantoj 'Lernu Esperanton!'. Dek (el dudek) gelernantoj partoprenis. Mi prezentis bazajn inforojn pri

la lingvo, krome informojn pri UEA, TEJO kaj la Universalaj Kongresoj. La kurso pluiros ĝis februaro 2025. Dankon pro la subteno al Spyros Sarafian, Kostas Kyriakos kaj Kostas Zacharakis.

Andreas Zervas

## Kanadaj rememoroj pri 1084




La nova, almanaka numero de Lumo estas havebla! Se vi partoprenis la Vankuveran kongreson de 1984, vi eble estos ĝoja legi ĝin kaj rememori pri tio, kio okazis antaŭ 40 jaroj. Se vi ne partoprenis ĝin, jen vi havos la ŝancon ĉeesti ĝin spirite kaj malkovri la rakontojn pri tiu unika evento en Kanado. Sed la vankuvera UK ne estas ĉio, kion ni preparis! Estas raportoj el Afriko, Skotlando, Usono kaj Kanado.
Ligilo al tiu numero: https://esperanto.ca/wp-content/uploads/2024/11/Lumo_2024_2.pdf

Pluraj numeroj de Lumo estas disponeblaj senpage al la legantoj en la retejo de Kanada Esperanto-Asocio: https://esperanto.ca/lumo/

Ĵenja Amis, la redaktoro

## Aŭtuna Ondo

Aperis en la reto la demonstra versio de la septembra (aŭtuna, laŭ la nordhemisfera vidpunkto) eldono de la trimonata bitgazeto *La Ondo de Esperanto*. La 52-paĝa demoversio (pdf) enhavas plurajn tekstojn kaj tekstokomencojn el la riĉenhava kaj rekorde ampleksa 162-paĝa aŭtuna eldono de *La Ondo*, dissendita al la abonantoj antaŭ sep semajnoj. Legu la senpagan demoversion kaj decidu pri (re)abono por 2025 https://sezonoj.ru/2024/11/ondo-133/

## Cele al fruktodona gazetara agado

Ĉi tiu seminario kombinas enkondukon al bazaj ĵurnalismaj principoj kun praktika trejnado pri efika informado pri Esperanto kaj Esperanto-eventoj al la ĝenerala publiko. Surbaze de la plurjara sperto de la ĵurnalisto Massimo Ripani, la partoprenantoj lernos pri verkado de artikoloj, kreado de amaskomunikilaj materialoj, kaj starigo de fruktodonaj rilatoj kun ĵurnalistoj kaj redakcioj. Ni esploros ankaŭ la rimedojn, per kiuj oni povas pli efike kapti la atenton de amaskomunikiloj kaj konatigi Esperanton. Itala Esperanto-Federacio atendas vin, jen la ligilo:
https://us02web.zoom.us/j/84539645494?pwd=bW1mbJak0goodEc87cDdhmWo97KtoC.1

## Presita revuo regule alvenas el Norvegio

Landaj Asocioj, kiuj eldonas fizikajn revuojn malpliiĝas daŭre. Elstara eŭropa escepto estas la *Norvega Esperantisto.* SMG regule ricevas tion en sia poŝtkesto kaj ege aprezas tion. Jen eroj el lastatempaj eldonoj. En volumo 2024-2 aperas la dua parto de intervjuo kun Douglas Draper kaj en volumo 2024.3 aperas artikoloj pri mirteloj kaj rilataj nordiaj beroj kun tabelo donante la nomojn en la sveda, norvega kaj sameaj lingvoj.




## Komuna legado por la Z-tago

Por la ĉi-jara Zamenhofa Tago kaj Tago de la Esperanta Libro, ILEI proponas komune legi la komencon de la teatraĵo *1910* de Ĵenja Amis. Legu la intervjuon kun la aŭtorino por Ĉina Radio Internacia. En ĝi estas la ligilo por elŝuti la tekston, kunligo por spekti filmon de la teatraĵo kaj konsiloj por mem ludi ĝin en via Klubo.

Alessandra Madella

## Eŭropa emfazo

La nova laborplano de UEA ne sukcesas aperi, pro tio mi proponas, ke la Eŭropa Komisiono reprenu por si la gloran praan labor-planon de la tempo de Lapenna, kiu konsistis el nur tri vortoj: informado, instruado kaj utiligado kaj ni provu agi laŭ ĝi. La unua konsilo estas, ke ĉiu landa asocio, loka grupo aŭ individua aktivulo faru tion, kion oni povas fari por disvastigi ĉi tiun simbolon kaj la tekston troveblan en

https://uea.org/vikio/Kategorio:Kampanjo_Esperanto_por_multlingva_E%C5%ADropo

## Universitata registraĵo

Registraĵo de la 55-a sesio de Esperanto en Universitatoj nun spekteblas en la jutuba kanalo de UEA: https://www.youtube.com/watch?v=77t4lPpxNqE

Ahmad Mamduhi

## Montevideo en la memoro

La 70-a datreveno de la rezolucio de Montevideo estas bona okazo por rememori la historion kaj la signifon de tiu dokumento, kiu reprezentas la komunan celon kaj idealon fare de Unesko kaj Esperanto: konstrui pacon en la mondo per kulturo, edukado kaj scienco. Tion ni festos la 10-an de decembro 2024 en Montevideo en la Parlamenta Palaco, kie okazis la Ĝenerala Asembleo en 1954

Renato Corsetti, Eŭropa Komisiono de UEA

## Kurso en la pola el Krakovo

Okazas varbado por la enreta kurso A1-A2 por poloj aŭ parolantoj de la pola lingvo, loĝantaj ie ajn en la mondo. La kurso estas malferma al plenkreskuloj de ĉiu aĝo. Por aliĝi, oni. kontakti min. Foto pri **unu el** la nun disvastigataj de la universitato informiloj pri kursoj de lingvoj: Foto: informilo pri kursoj de Jag. Univ. - libromarkilo

Maria Majerczak

## FAME kaj elane en Aalen

Fine de oktobro en la urbodomo de Aalen (Germanio) Chiara Raggi el Rimini, konata kiel Kjara, ricevis la 18-an Alenan Kulturpremion de la FAME-Fondaĵo kaj la urbo Aalen. Legu en *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2024/10/fame-3/

## Slovena bulteno – solena promeno

Bonvolu trafoliumi la novan numeron de la bulteno *Informacije / Informoj 2024/3 (septembro)*. Ĉiuj numeroj de la bulteno estas al dispono per la ligilo: http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0.

Redaktoro, Ostoj KRISTAN, sekretario de SIEL J

## Printempa reta kurso sukcese finiĝis

Krom UK 2025 en Brno, ĈEA esploris printempe alian novan kampon - instruadon de Esperanto per Interreto. Danke al la komuna laboro precipe de Milan Kolka, de la pedagogia sekcio (Miroslav Malovec, Mirka Tomečková, Jana Melichárková), de Josef Kalčík kaj de Pavla Dvořáková oni sukcesis prepari kurson gviditan de Milan Kolka kaj certigi sciigon pri ĝi uzante *Facebook* kaj retejon. El la nombro de 10 partoprenantoj, ses finis la kurson. Ni gratulas al ili ĉiuj kaj ni deziras al ili daŭran sukceson en malkovrado de Esperanto!

## Jozefo Németh servis al ILEI kaj IPR tra tri jardekoj

Okaze de la 30-jariĝo de nia revuo IPR, ni ne povas sufiiĉe danki al Jozefo pro lia grandega laboro kaj prizorgado pri ĝi. Danke al li, nun ni havas preskaŭ kompletan traserĉeblan arĥivon, kiu ebligas gravajn esplorojn pri la historio de nia Ligo, kiel la baldaŭ preta antologio de artikoloj fare de Fernando Pita. Danke al li, nia revuo ekvilibre balanciĝas inter klera, scienca parto kaj bunta, movada parto, donante tiel voĉon al ĉiuj niaj animoj kaj ebligante pli persvadan prezentadon al gravaj instancoj, internacie same kiel en diversaj landoj. Danke al li, nia revuo estas ankoraŭ papera, kio donas al ni prestiĝon en ĉiam pli cifereca mondo. Kaj fine, danke al li, ĉiun trian monaton akurate alvenas revuo kun belaj fotoj kaj tekstoj, kiu provizas per modelo de zorga lingvo-uzo por instruistoj kaj lernantoj. Mi esperas, ke Jozefo ankoraŭ longe daŭrigos sian laboron por IPR, portante nin al eĉ pli sukcesaj atingoj.

Alessandra MADELLA, vic-prezidanto de ILEIen IPR 2024/4

========= vortoj: 1150 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La unuaj kvardek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.